

Nova elano por Juna amiko

Dum la jaro 2013 nia revuo *Juna amiko* iom lamis. Aperis unu numero en oktobro kaj aperos la dua en decembro. Do nekontentiga situacio, kiam la kutima aperritmo estas tri numeroj jare. La redaktisto de *Juna amiko* estis Stefan MACGILL, samtempe prezidanto de la Ligo; li havis abundajn taskojn. Nun estas tempo por ni danki lin pro lia laboro por la Ligo, en tiuj du funkcioj. En julio Stefan MACGILL elektiĝis en la estraro de UEA kaj fariĝis vic-prezidanto de ĝi. Li plu ligiĝas al ILEI estante la oficiala ligo, peranto, de UEA kun ILEI. Sed la redaktoran taskon li devis forlasi.

Ni estas tre feliĉaj, ke ni trovis ne nur taŭgan personon, sed elstaran kunlaboranton: Stano MARČEK el Slovakio. Li redaktis la revuon *Esperanto* de UEA, la organon de Slovaka Esperanto-Asocio, li redaktas la organon de Germana Esperanto-Asocio, verkis faman lernolibron jam tradukitan al pli ol 30 lingvoj, eldonas librojn ktp. Do la redaktado de nia revuo estos konata tasko por li, kaj teknike, kaj grafike, kaj enhave.

Juna amiko (JA) ne estas la tasko de ununura persono. Aro da kunlaborantoj regule liveras artikolojn, kantojn, desegnaĵojn. Plie novaj personoj anoncis sin por kunlabori. La tasko de Stano estos estri tiun orkestron. En tiu skipo kelkaj personoj havas regulan rubrikon, kvazaŭ kronikon, aliaj liveras foje artikolon unikan. Mi jam ekrilatis kun tiuj valoraj helpantoj por nutri ilian motivadon: ni bezonas, bezonos ilin pli kaj pli en la venontaj monatoj kaj jaroj.

JA estas tre grava ilo por la Ligo, por la instruistoj, por la lernantoj. Ni planas eldonon de kvar numeroj jare ekde 2014. Temas pri papera revueto. Jam ideoj naskiĝis pri retaj ekzercoj en ligo kun iu artikolo, pri kunlaboro kun famaj retejoj por lernantoj... Ni devas kaj pluivivteni la revuon kaj labori per modernaj metodoj; nur tiel ni sukcesos kontentigi la nuntempajn abonantojn sed ankaŭ akiri novajn abonantojn. La abono kostas 16 EUR por personoj en A-landoj kaj 11 EUR por personoj en B-landoj, kaj estas rabato ekde 3 ekzempleroj. Abonu, donacu abonon al viaj familianoj, konatuloj, varbu kaj kontribuu! Mendilo troviĝas sur nia retejo *ilei.info*.

Mireille GROSJEAN
Prez. de ILEI